



Fonto de l' Francés (de l' Franco) - HOZNAYO



# SANTANDER



Anguleto de Pido. En la fundo la Pintoj de Europeo

2.230


## VERKARO

Liverota de Hispana Esperanto-Asocio preskaŭ preskote al la samideanaro :

- I.—TERMINOLOGIO DE LA ARKĤTEKTURO, de Francisko Azorín, 20 × 14 cm., 219 paĝa en luksa papero kaj pli ol 2.000 bildoj ilustrantaj la terminaron. PREZO : 8 svisajn frankojn.
- II.—MIA POEZIO (POEMARO), de Rafael de San Millán, 17<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 12<sup>1</sup>/<sub>2</sub> cm., 62 paĝa. PREZO 0'60 sv. fr.
- III.—LA KREITAJ PROFITOJ, komedio originale hispana verkita de Jacinto Benavente, tradukita de Vicente Inglada, 17<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 12<sup>1</sup>/<sub>2</sub> cm., 96 paĝa. PREZO : 0'75 sv. fr.
- IV.—LA GENIA KAVALIRO DON KIHOTO DE LA MANĀA (Rimarkoj pri la titolo de la verko, dediĉo, antaŭparolo, versaĵoj al la libro, k. c., kaj unua ĉapitro de la fama verko), de Cervantes, tradukita de Julio Mangada Rosenörn, 16<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 12 cm., 31 paĝa, luksa papero. PREZO : 0'45 sv. fr.
- V.—AVILA, de Julio Mangada Rosenörn ; historia-arta priskribo, biografioj de Sankta Tereso, la tutmondfama kristino, kaj de Alonso de Madrigal nomata *Oceano de la Sciencoj* (komenco de la XV jarcento), k. c., kun 30 belaj bildoj, luksa papero, 16<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 12 cm., 62 paĝa. PREZO : 0'75 sv. fr.
- VI.—FERDINANDO VI<sup>a</sup> KAJ FARINELLI, de Julio Mangada Rosenörn. Historia noveleto originale verkita proze kaj verse, 19 × 14 cm., 32 paĝa, luksa papero. PREZO : 0'60 sv. fr.
- VII.—PRI HISPANUJO KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ. POPOLKANTARO DE MURCIA, de Julio Man-

# SANTANDER

## TERITORIO-HISTORIO-KUTIMOJ MONUMENTOJ - K. C.



908  
MAN  
don



ARANGITA, TRADUKITA KAJ VERKITA  
DE  
JULIO MANGADA ROSENÖRN  
ELDONITA  
DE  
Hispana Esperanto - Asocio  
DANK' AL MONHELPO DE LA  
Nacia Patronaro por Turismo  
MADRID - 1933

Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio  
Rodríguez San Pedro 13 - 3<sup>a</sup> - 7. E-28015 MADRID  
Tel. 734 - (9) - 4466079


Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio

116x1999 hof 00223044

## TERITORIO KAJ KLIMATO




SANTANDER estas la ĉefurbo de la provinco ankaŭ same nomata, kies teritorio estas ĉirkaŭata de altaj montaroj escepte Norden, kie ĝin limigas la bravaj ondoj de la Kantabra Maro, kiuj furioze batadas la ondigan marbordon kaŭze de la potencaj ventoj blovantaj de l' Nordokcidento. Generale oni alnomas la regioneton *la Montaña (la Montaro)*, kaj tiel oni alnomas la santanderidojn *montañeses* (montaranoj). La Kantabra Montaro eniras la provincon tra la suda parto, de Oriento en Okcidenton, ĝis la tutmondfamaj *Picos de Europa (Pintoj de Eŭropo)*; de ĉi tiu montaro, kvazaŭ de duobla kombilo, deiras montaridoj al Nordo, mortante en la maro, kaj al Sudo, ebeniĝante en la plataĵoj de Kastilujo, for de la provinco. La montaridoj des pli apartiĝadas unuj de aliaj ju pli malalproksimiĝadas de la naskiĝloko kaj samtempe perdante alton; kaj tio ĉi okazigas profundajn kaj mallargajn valojn unue, kaj ke ĉi tiuj valoj plilarĝiĝas kaj ebeniĝas. De ĉi tiuj montaridoj deiras kvazaŭ perpendikle aliaj, dividante la valojn laŭ multenombraj aliaj valetoj, kvazaŭ fakoj de labirinto apartigataj unuj el aliaj de krutaj mallargaj intermontoj. La alteco de la montoj estas de 976 m. ĝis 2.639 m. sur la mara nivelo, kaj la plej altaj pintoj el la Pintoj de Eŭropo estas: *Torre del Llambrión (Turro de l' Jambrión)*, kun la lasta alteco; *Peña Vieja (Peña Vieja - Malnova Stonego)*, kun 2.615 m., kaj *Peña Prieta*, kun 2.528 m., inter la provincoj de Palencia, León kaj Santander. *Peña Labra*, kun 2.002 m., estas



Vidajo de Potes.

unu el plej rimarkindaj orografiaj lokoj de Hispanio, ĉar de ĉi tiu loko elfluas akvon en la tri marojn ĉirkaŭantaj la preskaŭinsulon : en ĉi tiu loko naskiĝas la rivero *Hijar*, kiun vere oni povas konsideri esti la rivero *Ebro*, alfluanta al la Mediteraneo ; iuj riveroj, alfluantaj al rivero *Pisuerga*, kiu kunigas sian akvon al rivero *Duero*, por alflui al la Atlantiko, ĉe Oporto ;




Greto de l' diablo en Hoznejo.

kaj la rivero *Nansa*, kiu iras enfluiĝi en la Kantabran Maron.


Fruktodonaj valoj, iuj vastaj, aliaj male ; ĉu longaj, ĉu kontraŭe, ĉu tiel longaj kiel larĝaj ; ĉu milde deklivaj, ĉu krutaj, kun foliplenaj malnovaj arbaroj, kun netraireblaj arbetajaroj, kun aleoj, kun kulturitaj kampoj kaj fruktoĝardenoj enkadrigitaj ĉu de simplaj blankaj muretoj aŭ de palisaroj kun kvazaŭ kreneloj ; kaj estas rimarkinde ke la kamparo abundas je fruk-

toarboj kaj strangaj fremdaj plantoj, kiujn kunportis migrintoj revenintaj al la naskiĝloko de ĉiuj partoj de Ameriko kaj de aliaj landoj, ĉar, kvankam la santanderido estas tre aventurema, li konservas profundan amon al la tero de la prapatroj. Herbejoj, odorante rave kaŭze de l' delikata aromo de plantoj kaj floroj, kiuj en ili nekulturate naskiĝas kaj kres-




Ponto en Liérganes.

kas. Riveretoj kaj riveroj fluadas rebrunte freneze kaj saltante de roko en rokon sur roktrancitaj fluejoj tra montgorĝoj, formante multenombrajn kaj belajn kaskadojn; alfoje ili fluadas serene kvazaŭ senmove kaj silente, kvazaŭ majeste rampante sur ebenaĵoj plenaj de ĉarmo, plilarĝiĝante kaj alirante morti trankvile ĉe la ŝaŭmantaj ondoj multfoje tondre bruantaj de la Kantabra Maro. La tuta kamparo estas kvazaŭ labirinta edeno plena de ĉarmoj por la vojaĝanto.




Vidaĵo de La Cavada.

La teritorio estas riĉa je minejoj (fero, plumbo, kupro, karbo, k. c., k. c.), kiujn aktive oni ekspluatias, eksportante al fremdlandoj la mineralojn; la mineralaj fontoj estas abundaj kaj variaj, pro kio same abundas la banlokoj. Grava estas la kulturo de la



Peña del Bejo (Stonego de l' Beho).


maizo, malpli tiu de aliaj cerealoj, legomoj, terpomo, fruktoj kaj lino, ankaŭ iom kulturata la vinberon. Granda kaj grava estas la riĉenhavo de la vidpunkto arbara, same ankaŭ la utiligo kaj reproduktado de la brutaroj, kiuj naskas gravegajn plensukcesantajn industriojn. La santanderido kulturata atente kaj ameme la kamparon, kaj eĉ li mem el la



Inter Hermida kaj Potes.


restaĵoj de la fiŝkaptado fabrikas la grundnutraĵojn por siaj terbienoj.

La klimato estas varia, laŭ la lokoj, sed ĝenerale ĝi estas malvarmeta kaj malseka : la meza temperaturo dum la jaro, estas 13°9 ; la plej alta, 30°5 ; kaj la plej malalta, 0°5, kaj estas gravaj influantaĵoj la




Intermonto de la *Hermida*.

ventoj kaj la proksimeco al la maro, kiu mildigas la malvarmon ; tial, en la marbordo, la klimato estas varmeta kaj malseka kaj fariĝante des malpli varmeta kaj des pli malseka ju pli malalproksimiĝas de la marbordo : la vento de la Nordo estas malvarma fojojn kun akompano de malseka nebulo ; tiu de la Nord-oriento, malvarma kaj seka, kun ĝi venas la neĝo plej



La arbaro el rokoj. *Hoznayo*.

abunda, ĉi tiu vento estas ofta dum la somero, pro kio Santander kaj ĝia marbordo estas loĝinda somer-restadejo; tiu de la Okcidento, venante de la Atlan-



Groto de Callabera.

tiko, sarĝate de malsekeco, maskas la plej oftajn kaj persistentajn pluvojn, ankaŭ estas pluviga la vento de la Nordokcidento, nomata *vendaval*, sed la pluvoj estas ŝturmaj, kaj oni konsideras ĝin tre saniga, pro kio estas la proverbo:

*La venteg' alvenas, jene;  
lasu ĝin fluadi bone,  
ĝin enspiru pulmoplene.*



Groto de l' Castillo. Puente Viego.

La vento de la Sudo estas seka, varma, tro sulfokanta dum la somero, kaj estas ofta dum la printempo kaj la aŭtuno, eĉ tiel forta kiel uragano; tiu de la Sudokcidento estas simila je la Suda, kaj dum la somero okazigas tondradojn kaj ŝturmojn. La lokoj,




kiujn batas la vento de l' Nordo, estas malvarmaj kaj malsekaj ; male tiuj, kiujn batas la vento de l' Sudo ; la lokoj, kies orientiĝo estas al Oriento, ĝuas




Pinto de Eñopo. Tiro Tiro kaj Llambión de Torre Blancas (Tiro Blanco).


varmetan temperaturon dum la tago, sed dum la nokto fariĝas malvarmaj, ĉar rapide malaltiĝas la temperaturo ; la lokoj, kies situo estas orientita al Okcidento, ĝuas plej agrablan temperaturon dum la tuta tago.



Groto de l' Castillo. Puente Viego.



De la laborkampoj al vilaĝo.




Pintoj de Eŭropo. Markita surirejo al la supro de Tiro Tirso.

## LA PINTOJ DE EŬROPO

**L**A grandiozeco, vario kaj grandega kaj impona beleco de la *Pintoj de Eŭropo* faras ĉi tiun montarlabirinton unu el plej rimarkindaj turistaj altiroj de Hispanio kaj unu el plej famaj montargrupoj tiaspecaj de Eŭropo. Pro tio la Nacia Patronaro por Turismo instalas en ĉi tiu loko, je 1.670 metroj sur la mara nivelo, tre komfortan rifuĝejon, la *Rifuĝejon de Aliva* (*Refugio - Refuĝejo de Aliva*), ĉe la plej strategia situo por kiel eble plej facile deiri al plej interesaj ekskursoj. En ĉi tiu *Rifuĝejo*, la turisto trovas varman kaj malvarman akvon, duŝejon, varmigadon, ĉambrojn kun du litoj, salonon kun tipa kameno, k. t. p. Ĉe ĝia biblioteko estas verkoj por senpage informiĝi pri la *Pintoj de Eŭropo*, pri ekskursoj, kaj, el ĉi tiuj, la plej interesaj estas: al *Peña Vieja* (*Penja Vieja - Malnova Stono*), 2.615 m. a. s. m. n., kun miriganta panoramo; al *Torre del Llambrión* (*Torre del Jambrión - Turo de l' Jambrión*'), 2.639 m. a. s. m. n., suprenirante tra *Lloroza*, de kies turo oni rigardas la *Naranjo'n de Bulnes* (*Naranĥo'n de Bulnes*), kaj, ĉe la piedo, la belegan lokon *Liordes*; al *Pico de la Padierna* (*Piko de la Padierna*), 2.400 m. a. s. m. n.; al *Valdecoro* (*Valdekororo*), 2.000 m. a. s. m. n., suprenirante tra *Lloroza*, oni vizitas la balkonon, de kiu oni povas admirigi grandiozan ravantan panoramon; al *Cumbre Arenas* (*Kumbre Arenas*), ankaŭ 2.000 m. a. s. m. n., de kie oni povas rigardadi tutan belegan teritorion de *Liébana*; al *Sotres*, 1.040

m. a. s. m. n., sur vojo borderata de altaj montoj, kaj plilongigante ĉi tiun ekskurson, oni alvenas proksime de *Bulnes* kaj de ĝia fama «*Naranĵo*», kies suprojn malmultaj turistoj trafis; al aliaj pitoreskaj lokoj plenaj de intereso kaj beleco, kiel estas *Tabla de Le-*



Ĉe la Pintoj de Eŭropo.


*chugales (Tabla de Leçugales)*, 2.445 m. a. s. m. n.; *Pico Hierro (Piko Ierro)*, 2.438 m. a. s. m. n.; *Pico Cortés (Piko Kortés)*, 2.373 m. a. s. m. n., k. c.

### PRI LA MANIERO EKSKURSI

Per aŭtoĉaro sur ŝoseo de *Santander* al *Espinama*, 137 km., dum tri horoj.

Per trajno kun kombino de aŭtoĉaroj:

Per Kantabra Fervojo (*Ferrocarril Cantábrico*) de *Santander* al *Unquera (Unquera)*. De ĉi tie al *Potes* estas regulaj aŭtoĉaroj, kiuj kombinas sian servon kun tiuj de *Potes* al *Espinama*, sed ankaŭ oni povas lui aŭtomobilojn en *Unquera*.



Pintoj de Eŭropo. Pintoj Raso kaj Albo.

De *Espinama* al *Riĵuĝejo de Aliva*, oni devas rajdi dum du horoj. En *Espinama* estas gastejo kaj aŭtomobilejo.

La entrepreno «*Cantabria Cars*» organizas dum la somero oftajn ekskursojn al *Pintoj de Eŭropo* per luksaj kaj tre oportunaj aŭtoĉaroj.

La plej oportuna kaj rapida vojiro sur ŝoseo estas: *Santander-Torrelavega-Cabezón de la Sal-Unque-*

ra, ĉar la ŝoseo estas bonege pavimita ; sed de la turista vidpunkto, estas pli interesa la vojiro *Santander-Barreda-Santillana del Mar-Comillas-San Vicente de la Barquera-Unquera*.



Pintoj de Eŭropo. Rifuĝejo de *Altoa*.

### INTERESAJ LOKOJ DE LA VOJIRO

(Elirejo : Generala Soseo al Madrido kaj Asturias)


PUEENTE ARCE, ĉe rivero *Pas* ;

BARREDA ;

VIVEDA, kun la familia domo de la fama teatroverkisto *Calderón de la Barca* ;

SANTILLANA DEL MAR, kiu estas tre riĉa de la arkeologia vidpunkto, kun kanonika preĝejo de la XII<sup>a</sup> jarcento, kiu estas nacia monumento ; kun

la *Torre del Merino (Turo de l' Merino)* de la XIII<sup>a</sup> jarcento, kaj kun aliaj monumentoj. Je du kilometroj de *Santillana* estas la *Cuevas de Altamira (Kuevas de Altamira - Grottoj de Altamira)*, kun mirindaj prahistoriaj pentraĵoj sur la roko ;




Pintoj de Eŭropo.

Vidaĵo de la supro de l' *Pirué*, ĉe la limo kun *Asturias*.

COMILLAS, agrabla somerrestadejo, kun malnova parto kaj la plaĝo de *Oyambre (Ojambre)* ;

SAN VICENTE DE LA BARQUERA kun ŝtona ponto el 32 arkajoj, miriganta panoramo, ruinoj de Kastelo, Monaĥejo de Sankta Francisko, *Casa de los Corro (Kasa de los Korro - Familia domo)* ; gotika preĝejo kun artaĵoj ;

DESFILADERO (INTERMONTO) DE LA HERMIDA, kiu estas



Intermontaj gorĝoj de la *Hermida*.  
Pintoj de Eŭropo.

grandioza kaj impona mallarĝa intermonta koridoro, tra kiu fluas la rivero *Deva* riĉa de trutoj kaj salmoj. Inter *Panes* kaj *Puente Ojedo* (*Ponto Ohedo*), staras preĝejo kun speciala hispan-araba stilo (mudehara stilo) (1), nomata *Sankta Mario de Liebana*, de la X<sup>a</sup> jarcento, kaj kiu estas nacia monumento;

POTES, kun tre belaj antikvaj domoj, kaj je tri kilometroj de ĝi, staras *Monaĥejo de Sankta Toribio de Liebana*. Gotika preĝejo.

#### GENERALA TARIFO POR SERVOJ

*Garaĝo en Espinama* : de 1 al 2 pesetoj po veturilo ĉiutage.

*Rifuĝejo de Aliva* : kompleta gastigado ĉiutaga, 25 pesetojn ; nur ĉiutaga ĉambro, 5 pesetojn ; matenmanĝo, 2 pesetojn ; tagmanĝo, 9 pesetojn ; vespermanĝo, 9 pesetojn.


*Dependejo de la Rifuĝejo* : ĉiutaga kompleta gastigado, 12 pesetojn ; matenmanĝo, 1,50 pesetojn ; tagmanĝo, 5,25 pesetojn ; vespermanĝo, 5,25 pesetojn.

*Oni postulu la tarifojn por ĉiaj aliaĵoj, kiujn decidis la Nacia Patronaro por Turismo.*

#### TARIFO POR GVIDANTOJ KAJ ĈEVALOJ

GVIDANTO : de 8 ĝis 10 pesetoj ĉiutage ; bona ĉevalo kun bona selo, 10 pesetojn ĉiutage, 5 pesetojn duontage ; azeno por porti valizojn, k. c., 5 pesetojn ĉiutage, 3 pesetojn duontage. Pro restado de bestoj


(1) Influo de la matraj artistoj en la kristana arto.



Pintoj de Eŭropo ĉe la limo kun Asturias. *Naranjo de Bulnes.*

en la bestejo de la *Rifuĝejo*, 1,25 pesetojn ĉiutage po besto.

La *Rifuĝejo* estas malfermata de la 1<sup>a</sup> de junio ĝis la 15<sup>a</sup> de oktobro. Dum la cetero de la jaro estas necese avizi du tagojn antaŭ la uzo por grupo el OK PERSONOJ MINIMUME, laŭ prezoj montritaj kaj por



Castro-Urdiales de aeroplano.

unu tago ; se la grupo estus el malpli ol ok personoj, oni devus pagi 25 pesetojn pliajn.

*Petu informon al la Oficejo de la Nacia Patronaro por Turismo en Santander (Avenuo de Galán y Hernández).*



Pasiego.

## LA SANTANDERIDO

**L**A indiĝeno de *Santander* estas nomata MONTANES de la ceteraj hispanoj, tio estas MONTARANO, li estas krude serioza kaj brava same, kiel aspektas lia regiono, dum ĉiuj tempoj; firma, kiel la rokoj de liaj montaroj estas; liberaj kaj sendependemaj, kiel estas la agloj kiuj nestas en la nealireblaj tranĉitaj pintosuproj de liaj imponaj montoj; neestimanta la loĝantojn de la ebenaĵoj, kiujn li konsideris esti malsuperaj, eble ĉar li vidis ilin malpligrandigintaj kaŭze vidi ilin de siaj plej altaj montarsuproj; forta, kiel la kverkoj de liaj arbaroj elvidiĝas; kuraĝa, konsekvence de la seninterrompa luktado kontraŭ la sovaĝaj bestoj kaj la ondoj de la tie ĉi impone furioza maro; nobla kaj grandanima, kvazaŭ kaptite de idealemo, kiu devigas lin rigardi la pluon preter la senfinan lazuron ŝiritan de la pintoj kaj krestoj de liaj montaroj, kiu devigas lin foriri el lia regiono al aventuro; tiamaniere estis la MONTANES (MONTANJES), kaj tiel-tial li sin montras hodiaŭ bonega civitano hispana, ĉar li konservas ĉion bonan el siaj primitivaj kvalitoj homamantigitaj de la rulado de la jaroj al progreso. Kiu estas lia deveno aŭ origino? Ion pri lia origino oni povas konsci per legado pri la mirindaj grotoj de Altamira.

Ĉi tiu popolo havis siajn simplajn kaj primitivajn


leĝojn same, kiel la ceteraj *kantabraj gentoj*, versen, kaj, kantante ilin, la gento transdonis leĝaron kaj kutimojn de generacio en generacion, kiel konstantan himnon, kiu vigle alparolis pri la nepra libereco, pri



Bela pejzaĝo.

la sendependo spite de ĉio, kaj tiamaniere ĉi tiu gento sentis la liberecon, la sendependecon, ke, okaze de danĝero al tiu sento, la nobla, bona kaj grandanima santanderido transformiĝis sangelverŝema, kruela ;

kantante li batalis ĉiam, kantante li mortis ĉe la batalo ne montrante la dorson al la malamiko. Ĉi tiu gento kantis siajn kultojn, siajn festojn familiajn, lokajn kaj regionajn ; la forpason de la vintro kaj alvenon de la printempo plena je promesoj ; la kavalirecon, la amon, k. c. La pasado de la tempo, trenante la




Anguleto de Puente-Viesgo.

politikajn, religiajn, sociajn ŝanĝojn, devigante la indiĝenon al kunvivado kun aliaj gentoj, nemiam al submetiĝo, iom post iom modifis ĉi tiujn kantojn, sed rimarkinda estas la greka influo, ĉar ankoraŭ persistadas en iuj valoj, edziĝkantoj kaj funebraj kantoj same kiel dum la tempo de *Estrabon*, kaj kiel nuntempe en Grekujo mem. El ĉio tio ĉi devenas la




riĉega muzika folkloro de *Santander*, el kiu jen du kantoj :



Castro-Urdiales de la haveno,  
laŭ desegno de la fino de la XIX jarcento.

Ami ŝin, jen postulo,  
malbona sorto;  
por ŝin vidi ja mankas  
al mi la forto.  
For de mi, for de mi,  
roz' de l' vilaĝo;  
ke mi ne ŝin vidu,  
ve, malkuraĝo!

Amatino maron iri  
volas; petas ŝi je vano,  
mi ne volas ŝin altiri,  
al terura marmalsano.  
Tero por la kor'  
ĉiam estas laŭ edeno;  
male, jen dolor'  
ĉe verŝajna marsereno.



Tipaj ĉaroj.

Kanto de l' montaro Harm. de Saez de Adanca

Andante energie

V. *A-mi ŝin, jen pos-tu-lo, mal-bo-na sor-to;*

energie

P. *por ŝin vi - ĉi jam man-kas al mi la for-to! For de mi, for de*

*mi, roz' de l' vi - - la-ĝo, ke mi ne ŝin vi - du, ve, malkuraĝo!*

*mi alegra*

rall. 1<sup>a</sup> Tempo

- ño! For da mi, for da mi A mi sin, jen pos-  
 lu-to mal-to-na sor-to; por sin vi-di jam  
 man-kas al mi la for-to.

*marcato*

Kanto de l' montaro Harm. de Saer de Otdana

Alegro *delicate*

V. A-ma-ti-no ma-ron i-ri vo-las; ne-tas

P. *Alegro*

si je va-no; mi ne vo-las sin al-  
 li-ri al te-ru-ra mar-mal-sa-no


Te-ro por la kor' ĉi-am es-tas laŭ e-

de-no; ma-le, jen do-lor' ĉe-ver-ŝaj-na

rall. k. pezante  
mar-se-re - - - no

rall. k. pezante

Ankoraŭ la fiŝkaptisto konservas kutimojn, kiuj venas de tre malnova epoko, el kiuj estas unu, kiu ankaŭ estis ĝenerala en Leonlando, Asturio kaj Galicio, kiun oni alnomas «*Je la bona ĉielĝuo*» (*La buena gloria*), kiu estas nedubebla restaĵo el la funebraj festenoj de la Egiptoj kaj Grekoj, kaj kiun la santanderidoj atentis «*pia ŝaro decidita eĉ de la testamento*»; kaj tiel forte estis enradikigita ĉi tiu kutimo en la




Preĝejo Santa María de Yerno. Cobicillos.

popolo de *Santander*, ke ĝi longedaŭre persistadis spite de la ordonoj, de tre malnova tempo donitaj, de episkopoj kaj pastroj kondamnantaj la kutimon ĉiel, kaj pri kiu popola versaĵo diras :

.....  
 estas ĝi ceremonio,  
 ĉiun deas ni praktiki  
 laŭ ordonis la praavoj,  
 la respekton eĉ apliki.

Kiam mortas dommastro, viroj kaj virinoj festves-


tite akompanas kadavron al preĝejo unue kaj poste al tombejo, unuavice la viroj, poste la virinoj. La akompanantaro revenas al la hejmo de la mortinto en sama ordo ; ĉiuj eniras ĉambron, la viroj okupas vicon laŭlonge la muroj, la virinoj enviciĝas same du-tri paŝojn antaŭ la viroj. La plej rajtigita akompanantino pro amikeco al familio de la mortinto antaŭenpaŝas al la centro de la ĉambro kaj laŭte krude diras : «*Patro nia*



Preĝejo de Bejoris.

por la eterna ripozo de la mortinto», la ĉeestantaro preĝas, kaj dume la virino, demetante de sia kapo la nigran mantilon, ĉi tiun sternas sur la plankon kaj samvoĉe petas «donu dudek kvin centimojn po ĉiu por la doloratoj», aŭ anstataŭ peti tiun sumeton ŝi petas tiun, kiu antaŭe estis interkonsentata. La virino viglas la plenumon de la postulo, kaj kalkulinte la rikolton kaj laŭ decido de la ĉeestantoj, la plej fidinda

eliras por aĉeti kaj alporti panon, fromaĝon, vinon kaj brandon. Dum la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estas alportataj, la ĉeestantaro preĝadas. Alveninta la fidindulo kun la alportitaĵoj, la unuajn panpecon kaj fromaĝpecon kaj la unuajn glasojn da vino kaj brando oni donas al la vidvino, dirante al ŝi : «*por ke la mor-*



San Vicente de la Barquera.

*tinto plej bone ĝuu la ĉielon»*; ĉiuj manĝas, trinkas kaj ekkrias de tempo al tempo «*je la bona ĉielĝuo de la mortinto*».

Ĉar la santanderido estas ema al plej bona ekonomia stato, tial li estas migrantema. Li forlasas la naskiĝlandon por havigi al si riĉaĵojn per sia laboremo kaj ŝparemo, kaj kiam li estas trafinta sian celon, li revenas al la naskiĝloko, kie li ĝenerale fariĝas sin-

donema al bonfarado kaj kulturigo ; li same elmigras al Ameriko, kiel al aliaj hispanaj regionoj. La elmigrintoj, reveninte al naskiĝloko, malavare fondis lernejojn, hospitalojn kaj aliajn kulturigajn kaj bonfarantajn instituciojn. La elmigrinto al Ameriko estas nomata *indiano* ; tiu al Andaluzio, *jándalo* (handalo).

Estis granda superstiĉo ĉe la vilaĝanaro, kaj ape-  
naŭ estas loko, kiu ne havas sian magiistinon, kiu ne



Bela kaj arta maŭzoleo de l' Inkviziciestro Corro.  
*San Vicente de la Barquera.*

estas *sorcistino* aŭ *divenistino*, pri kies fenomenoj oni kredis kaj ne ilin malamis, sed male, eĉ oni petis iliajn konsilojn kvankam oni konsideris ilin demoninoj. Oni tre malamis la magiistinojn, ĉar ili estas kaŭzantaj ĉiam ĉiajn malbonaĵojn, kaj ĉiusabate, meznokte, rajdante sur balailo, iras tra la fumelirejo de la kameno kaj aero kunveni ĉirkaŭ kratago sub prezido de la diablo enkorpiĝinta en kapro ; la mistera forto, ilin veturigante, konsistas el du elementoj : el ŝmiraĵo nigra pli ol peĉo, kiun ili gardas sub la grandaj plataj

ŝtonoj de la kameno, kaj el kiu ili ŝmiras siajn korp-  
ojn ; kaj el vortoj, kiujn ili parolas ŝmirante sin :

*Sen Di', sen Sankta Mari', jen  
mi tra la truo de l' kamen'!*

Longajn malvarmajn horojn dum la vintro pasigas la kamparanoj apud la kameno, ĉirkaŭ la fajro ; parolante pri variaj aferoj eĉ politikaj, aŭ rakontante tra-




Stampilo de la urbestaro. XIV jarcento.  
*San Vicente de la Barquera.*

diciojn, legendojn, historiaĵojn, k. c., la viroj, kaj dume ankaŭ la virinoj faras laborojn.

Estas rimarkinda kutimo en la vilaĝoj, pro kiu la junuloj, grupiĝinte, bruante sur la stratpavimojn per siaj maldelikataj primitivaj ledpantufloj, kriadante simile je la bleko de ĉevalo, iras de domo en domon, petante sangkolbasojn, aliaĵojn, monon, je la nokto de la Kristnasko. Fojojn, la petitoj trompas ilin per kolbasoj el cindro kaj per putriĝantaj ovoj. Oni nomas ilin *marzantes*, kaj la kutimon *marzas* ; sed oni opinias prave, ke ĉi tiu kutimo, laŭ konstatas la nomo



Al rendezuejo... (Desegno de la senmorta Goya.)



Turo de preĝejo. Valo de Toranzo.

*marzas—mar'ajoj—*, devenas de la festantaj kutimoj dum marto, kiam la grupoj el junuloj, profitante la varmetajn noktojn de ĉi tiu monato, festis per kantoj kaj petoj ĉu riĉulojn, ĉu aŭtoritatulojn, ĉu belulinojn, farante la kanton per kvazaŭ ploranta voĉo, sen akompano ia ajn kaj per simpla ritmo, kvazaŭ simpla kanto de la katolika liturgio. Sed vere la kantoj estas degenerintaj laŭ variaj romanoj.


Jen unu el la kantoj, kiu elvidigas aŭ prezentas intereson :

«Ne malgentilaĵo,  
ne, do, malobeo,  
estas ĉe nobluloj  
ĵam kanti sen pero ;  
ni kantos, sinjoro,  
kun via permeso,  
ni diros la *marzojn*  
kun granda saĝeco.  
Aŭskultu, nobluloj  
kun granda l' atento,  
vi aŭdos la kanton,  
tre novan la verkon,  
ni venas ĝin kanti  
kun brua kontento  
de l' aĝo tre frua,  
en plena juneco,  
kaj kiel ĝin kantis  
prapatroj je l' tempo ;  
ni faras, do, same,  
sekvante l' ekzemplon.  
Konsciu, ni venas,  
pardonu la ĝenon,  
ne por al vi doni ;  
ricevi, jen celo,  
la lardon, la ovojn,  
la porkan piedon,  
la nuksojn, kaŝtanojn,  
eĉ ankaŭ moneron  
por trinki la vinon,  
ĉar en la vendejo

ja donas nenion  
sen mona la pero.  
Ne al la fraŭlinoj  
nun nia sinteno,  
jes al sinjorino,  
al ŝia la edzo  
por ke ĉi sinjoro  
ne havu ĉagrenon.  
Eliru, fraŭlino  
kun granda la belo,  
ŝi havu fianĉon  
kun granda bieno,  
kun oraj koluno  
kaj manumekstrema ;  
kaj ankaŭ la frato  
ricevu tempbenon,  
eĉ patro, patrino,  
sub sama tegmento,  
eĉ ankaŭ servistoj,  
al ĉiuj ne ĝenon...

... ..  
... ..  
... ..  
Adiaŭ, sinjoro,  
ĝis nova reveno...  
premiu vin Dio  
pro la sindonemo,  
Anĝeloj ni estas  
de la mem ĉielo,  
ni poŝojn ja havas,  
donu, do, moneron.»

La gvidanto de la grupo, maskante la voĉon, kvazaŭ de ploranto ĝi estus, alveninte al pordo de domo, demandas ĉu la dommastro volas, ke la grupo preĝu aŭ kantu ; kaj decidite, laŭ la respondo, tiel oni faras.




Preĝejo de Lebeña.

La junuloj profitas la rikolton manĝante kaj trinkante en la vinvendejo.


Ankaŭ oni devenigas de la Grekoj popolan kutimon por la edziĝfestoj : de tre frumatene, se la vetero estas milda, la pordoj kaj fenestroj de la fianĉdomo aperas ornamitaj abunde kaj bele el rozoj, el aliaj floroj kaj el rosmareno. La plej bonaj kuiristinoj de

la vilaĝo, eĉ de la ĉirkaŭaĵoj, elplumigas kokinojn, aliajn birdojn, preparas ĉasitaĵojn, aranĝas kaj spicas manĝaĵojn kaj hejtas la fajron ; tial, tra la kamentruo kun la fumo ankaŭ eliras kaj ĉien disigas odoroj, kiuj, trafante la flarorganon de la vilaĝanoj, stimulas ia guston al partopreno en la festenoj. Ĉe angulo de la



Detalajo de la preĝejo de *Lebeña*.


korto, aliaj malplej lertaj kuiristinoj kuiras en grandaj kaldronoj bovinidpecojn ; en la centro de la sama korto, oni instalas vinfontanon, kaj, en alia loko, oni starigas altan fortan stangon ŝmiritan el graso por grimpi kaj trafi premion metitan ĉe la pinto ĉu la ŝmiraĵo ne glitigas suben grimpanton antaŭ ol trafi ĝia



Detalajo de la preĝejo de *Lebeña*.



premion ; multenombraj raketoj trairas la atmosferon kaj en ĉi tiu eksplodas ; tipaj flutistoj trairas la strat-




Bronza mesa librotlenilo. XVI jarcento.

Preĝejo de *Laredo*.



Tre antikva skulptitaĵo de la preĝejo de *Lebeña*.


ojn de la vilaĝo, de loko en lokon, ludante la muzikilojn kaj aŭdigante la tipajn regionajn muzikaĵojn ; la sonoriloj de la preĝejo sonoradas febre ; la fraŭloj kria-



Portalo de la preĝejo de *Plasca*.


das, imitante la blekon de la ĉevalo, kaj la fraŭlinoj ornamas siajn mantamburetojn el brilkoloraj rubandoj kaj el tintiloj.

Gaja kaj pitoreska grupo el fraŭloj kaj fraŭlinoj festvestitaj eliras el la korto, kie ili kunvenis kaj iras



Flanka absido de la preĝejo de *Piasca*.

al la domo de la fianĉino akompanante la fianĉon kaj liajn gepatrojn : unuavice marŝas kvar popolaj futlistoj ; duavice, la fianĉo, lia patro kaj multaj dancantoj ; triavice dekdu kantantinoj kun mantamburetoj, kiujn ili ludas por akompani la kantojn, sekve amaso



Centra absido de la preĝejo de *Piasca*.

el gefraŭloj de la vilaĝo. Ĉie amaso el gevilaĝanoj kuriozemaĵas la akompanantaron. La kvar flutistoj aŭdigas tre tipajn popolajn dancojn, je kies takto, serioze kiel aŭtomatuloj, la dancantoj piedbatas kaj bruigas marŝante. Dum la flutistoj silentas, la kantantinoj kantadas kaj ludadas la mantamburetojn, sed estas unue ses kiuj je malrapida takto melankolia kantas laŭ jeno :

*«El gefianĉoj de l' lando,  
jen certe ja la plej belaj;»*

kaj poste, la ceteraj ses, samtakte, kantas kompletante la strofon per la jenaj versoj :


*«protektu ilin sanktuloj,  
al ili benoj ĉielaj.»*

Sekve, la dekdu kantantinoj samtempe rekantas la kompletan strofon :


*«El gefianĉoj de l' lando,  
jen certe ja la plej belaj;  
protektu ilin sanktuloj,  
al ili benoj ĉielaj.»*

Tiamaniere alternas flutistoj kaj kantantinoj ĝis alveno al la pordo de l' domo de la fianĉino, kie ĉiuj haltas kaj silentas momente. Tuj la fraŭlaro unutone blekadas, tiel forte laŭ eblo, kaj sekve la kantantinoj, dum la fianĉpatro batas trifoje per la mano la pordon de la fianĉino, kantas :

*«Día suno de ĉi valo  
jam eliru el malhelo,  
ĉar ĉe cia pordo brilas,  
kiu estos cia stelo.»*



Portalo de la Kanonika Preĝejo de Cervatos.




Absido de la Kanonika Preĝejo de Ceratos.

Oni malfermas la pordon kaj aperas la fianĉino kaj ŝiaj gepatroj : ŝi, ruĝigante kaj riĉvestite, kaj ŝiaj gepatroj kuniĝas al la fianĉo kaj al liaj gepatroj, kaj ĉiuj aliras al la preĝejo, same kiel estas dirite, por okazigi la edziĝceremonion. Kiam fianĉo aŭ fianĉino apartenas al altranga familio de la vilaĝo, la pastro, la instruisto kaj la urbestro aŭ vilaĝaŭtoritatuloj, ceremonie akceptas ĉiujn ĉe la pordo de la preĝejo, kaj post la ceremonio ĉi tiuj akompanas la novajn geedzojn kaj partoprenas la festenon, kiu disvolviĝadas ĉe la fianĉo por la familianoj kaj aŭtoritatuloj, ĉe la korto, por la flutistoj, kantantinoj kaj akompanantaro.

Ankaŭ similan feston oni okazigas ofte por honori sukcesintan *indiano'n* aŭ *jandalo'n*.

El ĉiuj santanderidoj diferencas la loĝantoj de la valo de l' rivero *Pas*, nomataj tial *pasiegos*. Eĉ oni opinias, ke ili estas gento el stranga deveno, kiu trafis la valon dum la militado kontraŭ la maŭroj, kiam ili estis servutuloj, pro kio oni opinias, ke ili estas el mahometa deveno ; sed oni devas konstati, ke la *pasiego* ne ŝatas resti en la sama loko, ke li iras de loko en lokon, kondukante sian brutaron por havigi al ĉi tiu herbojn kaj akvon ; ke li estas komercisto ; ke la venĝemo estas al li kvazaŭ religia devo nepra, pro kio li konscias malkuraĝa tiun, kiu ne sin venĝas ; ke li estas sobra ; ke li konservas la arogantecon kaj sendependemon de la pasintaj epokoj, pro kio li malŝatas oficojn, kiuj devigas al submetiĝo, celante ĉu ĉe la lando, ĉu for de ĝi, vivi libere, ne tolerante mastron. Iuj opinias, ke la *pasiegos* estas tiel aparta gento, kiel estas judoj, ciganoj, k. c. Li estas forta, kuraĝa, kalkulema, komercema, industriema kaj lerta. Oni ne povas konscii *pasiego'n* sen alta bastono, kiu iam estis al li ĉu armilo, ĉu apogilo, ĉu levigilo, ĉu

ŝildo, ĉar per ĝi li sin ŝirmis kontraŭ spado, lanco, paŝita ŝtono; per ĝi, li firmege saltas mirinde kaj



Stuparo de la palaco de Soñanes, Villacarriedo.

fulme riveron, muron, fosaĵon, k. c. ; per ĝi, li ĉasadas... : la bastonego de l' *pasiego* estas kvazaŭ magia kaj mistera talismano, per kiu li faras mirindaĵojn.

La *pasieg'ino* estas ankaŭ altkreska kaj forta, kun fizionomio tre agrabla, bela, kun kapabloj samaj, kiaj




Pasiega (pasiegino).

estas tiuj de la *pasiego*. Tamen ĉi tiu gento sufiĉe degeneris pro kunpariĝo de samparencanoj.



## PRI LA URBO SANTANDER

**H**ISTORIO.—Laŭ *Plinio*, ĉi tiu urbo estas *Portus Victorioe*, kie *Marco Agriĉa* venkegis la Kantabrojn, 21 jarojn antaŭ nia Ero. Dum la unuaj jarcentoj de la milito kontraŭ la maŭroj, oni nomis la teritorion de la provinco *Asturias de Sancto*



*Santander* je la XVI<sup>a</sup> jarcento, laŭ tiama bildo.

*Anderio*, sed la loĝantoj de *Portus Victorioe* ŝanĝis la nomon de la urbo per *Portus Sancti Emetheri*, kiu iom post iom transformiĝis *Portus Sancti Anderii*, de kiu devenas *Sant Ander*, nune *Santander*. Je la unuaj tempoj de la Mezepoko la urbo estis dividata en du partoj, kiuj malamike sin kondukis reciproke, okazi-

gante hombuĉadon. Ĝi estis tre grava dum tiu tempo, kiel haveno de Kastilujo; ĝiaj maristoj partoprenis la konkeron de *Sevilla*. De la fino de la XII<sup>a</sup> jarcento, la urbo havis leĝojn, kiujn al ĝi donis Alfonso VIII<sup>a</sup> en *Burgos*, kaj la du malamikaj kvartaloj, aŭ partoj de la urbo, unuiĝis sub regado de Abato, sed tamen ne finiĝis la rivaleco de la enloĝantoj de unu kaj alia




Bela perspektivo. *Santander*.

parto, pro kio estis ankoraŭ interbataloj, precipe dum la XIV jarcento pro rivaleco inter nobelaj familioj de unu kaj alia partio. Mastrumis la urbon reĝidoj kaj nobeloj, kaj el ĉi tiuj estis Markizo de Santillana la plej malamata de la popolo, kiu militis kontraŭ li, kaj tiel sukcese kontraŭ la tiranaj pretendoj de la Markizo, ke la reĝo, je majo de 1467, nuligis la mas-

trumon antaŭe deciditan, kaj alnomis la urbon **TRE NOBLA KAJ LOJALA**.

Je 1497, la urbo akceptis kaj gastigis reĝindinon *Margarita*, venintan por edziniĝi kun la reĝido *Don Juan*; en la urbo loĝis la reĝo *Carlos I<sup>o</sup>*, je septembro de 1517, kaj al ĉi tiu urbo alvenis la reĝino *Ana*, kvara edzino de *Felipe I<sup>o</sup>*, je oktobro de 1570. Je ĉi tiu tempo la urbo ekriciĝis dank' al komerco kun




Biblioteko Menéndez Pelayo. Santander.

Ameriko, ĉar ĝia haveno estis konsiderata la plej bona de la Kantabra Maro, kaj oni starigis la faman ŝip-konstruejon de *Guarnizo*. La graveco kaj potenco de *Santander* kreskadis kaj ĝi atingis la rangon de urbo je 1755, daŭrigante sian prosperigon.

Dum la milito kontraŭ Napoleono, la urbo estis okupata kaj forlasata diversfoje de la franca armeo. Je 1868 la loĝantoj partoprenis la ribelon kontraŭ la reĝino *Isabel II<sup>a</sup>*, kaj spite de la heroeco de la loĝan-


toj, de ilia obstina rezistado, generalo *Calonge* kaj lia soldataro trafis eniri la urbon; sed pro la terura rezistado de la loĝantoj, la generalo kun la armeo forlasis la urbon. Tamen ankaŭ la ribelantoj plimultenombraj enŝipiĝis por aliri al *Santoña*, kaj tiam estis, kiam



Monumento al fama romanisto Pereda. Santander.

la generalaĉo eniris denove la urbon kvazaŭ heroa venkinto.


La 3an de novembro de 1893, terura katastrofo funebriĝis la urbon: vaporŝipo *«Cabo Machichaco»*, en ĝia haveno, kun granda ŝarĝo, 51.400 kilogramoj de dinamito, ekbruliĝis kaj fine eksplodis pro neebleco estingi la bruladon; la eksplodo jetegis en la urbon kaj ĉirkaŭaĵojn diluvon el reloj, ŝraŭboj, feraĵoj,



«Sardinero». Unu el la plagoj. Santander.

ŝiprestaĵoj brulantaj, k. t. p., disemante la bruladon ĉien, precipe en la kajojn, en kiuj bruladis pli ol 50 domoj. Estis 600 mortintoj kaj milo da vunditoj; la belaj stratoj Méndez Núñez kaj Calderón fariĝis rubamasoj.

La ŝildo de Santander aperigas velsipon celantan rompi katenon, kiu, de kastelturo, venas al maro;




Bela vidaĵo de la haveno. Santander.

blua fono sur kiu elvidiĝas du kapoj. La urbo havas la titolojn : *Tre Nobla, Ĉiam Fidela, Decidita (Kuraĝa), Urba Moŝto*.

NUNTEMPA SANTANDER. — Santander havas tre mildan klimaton pro unu el branĉoj de la granda marfluado venanta de la golfo de Meksiko, ĉar tiu branĉo fluadas proksime de ĝia marbordo kaj varmigetas la temperaturon dum, samtempe, la maraj ventetoj refreŝigas la ambienton; tial, laŭ la oficialaj konstatoj





«Sardineos». La tri plaĝoj, Santander.


de la Observatorio de la urbo, la meza temperaturo dum la jaro ĝenerale estas  $14^{\circ}$ ; la meza dum julio, la plej varma monato,  $19^{\circ}$ ; kaj dum januaro, plej malvarma monato,  $10^{\circ}$ . Komparante ĉi tiujn temperaturojn kun tiuj de aliaj eŭropaj plaĝoj, oni konscios, ke *Santander* estas de ĉi tiu vidpunkto la plej supera el ĉiuj plaĝoj; sed, de ĉiuj aliaj vidpunktoj, same



«Sardineos». Plaĝo kaj Kazino, Santander.

rezultas: la urbo staras sur terlango eniranta en la maron, kaj la maraj ventoj karesas la urbon, farante ĉi tiun unu el plej sanigaj de la mondo, kaj ĉi tion evidencigas la alta aĝo trafita ĝenerale de la loĝantaro. La ĉirkaŭanta panoramo estas nepriskribebla bela kaj ravanta: promenejoj kaj arbaroj kun rimarkindaj perspektivoj, kies fono multfoje estas la kobalte blua


maro. Sur la rando de vasta kaj belega natura haveno, kun multenombraj pitoreskaj vilaĝetoj, ĉe la piedo de rimarkinda altano de kies supro oni povas admiri grandiozan horizonton, kiun limigas *Montaro de Tras-*



El la plaĝo, *Santander*.


*miera*, tiu de *Peña Cabarga*, *Soba* kaj la maro, la domaro elvidiĝas kvazaŭ preskaŭ duoncirkla amfiteatro protektata de la longa monteto de l' *Alta* kontraŭ la malvarmaj ventoj de l' Nordo.

La urbo prezentas du rimarkindaĵojn : tiun de la



Rokoj de la *Konko*, *Santander*.

malnova urbo kun ĝia tradicia aspekto pro la mal-  
larĝeco de la stratoj kaj antikveco de la konstruaĵoj ;



Vidajo el Sardinero. Santander.

tiun de la moderna parto kun tre larĝaj stratoj kaj  
tute moderna altvalora konstruaĵaro, kun la plej grava  
haveno de la Norda Hispanio kaj kun la mirinda kaj

eleganta plaĝo de l' *Sardinero* kaj ĝia kvartalo el riĉaj  
vilaĵoj kaj palacoj, al kiu kondukas la Avenuo de Pablo  
Iglesias de la centro de la urbo, kaj estas ĉi tiu Avenuo  
unu el plej belaj promenejoj de la mondo. La famo  
de la plaĝo ne devenas nur de tiuj pitoreskaj kaj kli-  
mataj allogantaj cirkonstancoj, sed ankaŭ de ĝia vas-  
teco, de la orkolora kaj delikata sablo ĝia, de ĝiaj kon-  
diĉoj farantaj konstante la banon agrabla kaj senriska  
sub belega lazuro de la somera ĉielo.


Santander havas 82.000 loĝantojn kaj ĝia parto  
nova estas mirinde riĉigata de belegaj promenejoj, el  
kiuj la plej rimarkinda estas la *Paseo Alto* (*Alta*  
*Promenejo*) laŭlonge monteto kronanta la urbon, de  
kiu oni povas admiri la belegan kamparon, la urbon  
kaj la maron.

Rimarkindaj konstruaĵoj de Santander estas : la  
moderna *Biblioteko de Menéndez y Pelayo*, en la strato  
*Gravina*. La libron kaj la konstruaĵon cedis al la  
urbo la eminentega verkisto tiel alnomita ; sed la kons-  
truaĵo estas belege kaj arte aliformigita laŭ projekto  
de la genia arkitekturo Leonardo Rucabado, kiu  
naskiĝis en la lando. Antaŭ la konstruaĵo, ĉe bela ĝar-  
deno staras la statuo de la senmorta verkisto. De la  
naŭa matene ĝis la dua posttagmeze la publiko povas  
profiti la libron ;

la *Urbodomo* (placo de *Pi y Margall*), en kiu oni  
povas admiri pentraĵojn de *Goya*, portretojn de *Ferdi-*  
*nando VII* ; ankaŭ en ĉi tiu konstruaĵo estas provizore  
instalita la *Urba Muzeo*, kiu entenas gravan rimarkin-  
dan prahistorian kolekton al arkeologiaĵoj ;

la *Mara Biologia Stacio* (strato *Castelar*), fondita  
je 1886, sed lokumita en Santander je 1907, konsis-  
tanta el Muzeo, Akvario, laboratorioj (hemia kaj bio-  
logia) kaj biblioteko ;

la *Generalaj kaj Teknika Instituto* (strato *Santa*




Pordo de la Katedralo al la Klauŝtro. Santander.

*Clara*), mirinda konstruaĵo plensukcesa al kultura celo;

la *Poŝt* kaj *Telegrafdomo* (avenuo de *Galán y García Hernández*), rimarkinda konstruaĵo laŭ regiona stilo.

La grandega Sanatorio *Valdecilla* (strato *Valdecilla*), kiu estas unu el plej bonaj de l' mondo.

La katedralo, antaŭe abatejo nur, staras ĉe la fino de la plej antikva strato *Ruamayor*.



*Al-midhá*. (Katedralo. Santander.)

Ĝi estas ogiva konstruaĵo de la fino de la XIII<sup>a</sup> jarcento, reformita je la XVII<sup>a</sup> kaj XVIII<sup>a</sup>. En la ĉefa fasado staras la kvadrata masiva turo, kvazaŭ fortikaĵo, kun ogiva fenestro. Tra la turo estas ogiva arkajo sur kiu lokumiĝas ŝtona ŝtuparo al *Ruamayor*, ĉe kies piedo estas arkadaro, el kiu la unua kaj du lastaj arkajoj estas de la XVIII<sup>a</sup> jarcento same, kiel la ŝtu-

paro sur la unua arkaĵo al alia pordo de la katedralo ; la du ceteraj arkaĵoj estas ogivaj, eble de la tempo kiam oni starigis la abatejon. Sub ĉi tiuj du arkaĵoj elvidiĝas ogiva pordo, kiu estas unu el plej rimarkindaj artaj arkitekturaj specimenoj de la urbo. La katedralo havas tri navojn, la ĉefa estas interrompita de la ĥorejo, kiu estas de la unua duono de la XVII<sup>a</sup> jarcento sed kun tre dekadenca stilo. Estas iom rimarkinda la kapelo de *Ribaherrera*, el dekadenca grekoromana stilo, riĉa, kronita de ronda lanterno kun la ŝildoj de la fondintoj. Dum la lastaj jaroj de la XVII<sup>a</sup>

ا يا ايها من  
 المهاني صناع جسي من فصة بجاء وكان الزلال  
 اذ صار الفنى | ا سرد رقى قعره  
 خرفا هودولى حشافة | ا غير الى جسد قام من  
 حيرد المساء | ا


Araba skribajo de l' *Al-midhá*.

jarcento kaj unuaj de la XVIII<sup>a</sup>, oni anstataŭis bedaŭrinde la malnovan ogivan absidon per la nuna ĉefa kapelo, kies granda altaro estas dekadenca sed rimarkinda, ĉar ĝi estas sperte farita.

En la navo de l' Evangelio, ĉe angulo ekstrema, altiras atenton de la vizitanto, ĉi tiun mirigante, akvuĵeto el blanka marmoro sur koloneto kun kapitelo araba laŭ stilo de *Granada* ; ĝi estas araba laveĵeto, *al-midhá*, produktita de la hispan-araba arto, kiun la fervoro de kavalira partopreninto de la konkero de *Córdoba* transportigis al la tiam abatejo de la ankoraŭ tutmondfama moskeo de *Córdoba*. Ĝi prezentas skulptitan araban skribaĵon, kies traduko estas la jena :

«Ho, vi, tiuj, kiuj soifas je pureco! Mia korpo estas verko el naŭva kaj ŝveliganta arĝento! Vidu kiel ĝi falas fariĝante ŝaŭmo preta likviĝi ĉe la fundo, timigite de siaj subtileco kaj delikateco, transironte poste formi korpon mirindan el glaciigita akvo!»

La klaŭstro estas el ogivaj arkaĵoj sur romboformaj kolonoj.




Preĝejo de l' Kristo. *Santander*.

Por konstrui la malnovan abatejon estis necese konstrui unue vastan kripton, kiun oni devenigas de la XII<sup>a</sup> jarcento aŭ komenco de la XIII<sup>a</sup>. La kripto konsistas el tri navoj malaltaj, kun arkaĵoj apenaŭ ogivaj, sur kolonoj, kies fustoj estas mallongaj kaj staras sur altaj bazoj. La kripto estas rimarkinda kun bela fenestro maldekstren de la enirejo.

Iomete atentinda estas la preĝejo de la *Anuncia-*

*ción*, kies stilo estas greko-romana de la XVII<sup>a</sup> jarcento, kaj tiu de *Santa Lucía*.


De la SPORTA vidpunkto *Santander* estas plej



Detalaĵo de la Kripto. Katedralo.

supera somerrestadejo, ĉar en ĝi oni povas praktiki ĉiajn sportojn : ALPAJN EKSKURSOJN, ŜIPKURADOJN ĉu motoraj, ĉu de velaj, ĉu de remilaj boatoj ; FIŜKAPTADON en la maro kaj en la riveroj, en kiuj loĝas bongustegaj trutoj kaj salmoj ; GOLF'N,

por kiu estas du bonegaj arenoj (GOLF PEDREÑA kaj GOLF OYAMBRE), situanta la unua ĉe la kontraŭa bajobordo al tiu sur kiu staras *Santander*, al kiu kondukas motoraj boatoj de la Klubo mem ĉiudokminute, farante tiel kvazaŭ dekkvinminutan mar-ekskurson belegan. Mirindaj estas la arenoj de la SO-



Fenestro de la Kripto. Katedralo. *Santander*.

CIETO LAWN-TENNIS, KOLOMBIDPAFEJO, FOOT-BALL, TAŬRLUDADOJ, k. t. p. Tipaj popularaj festoj, foiroj, resume, ĉiaj amuzigaj festoj estas organizataj seninterrompe de junio ĝis oktobro, tiamaniere ke dum la sama tago oni povas ĉeesti ĉasokazantajon en sovaĝa arbaro kvazaŭ en la Centra Afriko, ĉasante aprojn kaj aliajn sovaĝajn bestojn, tenison,



El rimarkinda tombo de Petro de Ozayo  
ĉe malnova klaŝtro en Monte Corbán.

ne malpli bone luditan ol en Wimbledon kaj elegantan aristokratan balon.

Kvankam la boatkuradoj estas la laste organizitaj amuzadoj, *Santander* estas konsiderata jam en la unua vico de la vidpunkto YACHTING, de kiam ĉi tiu urbo estis finloko por la transoĉeana markurado de *New-York* al *Santander*, je 1928. Poste la boatkurado *Plymouth-Santander* fariĝis ĉiujara rimarkinda tutmonda okazantaĵo, kiel la internaciaj markuradoj (I. F.) de *Santander* por velŝipetoj 8-6 metrojn longaj, kaj estas rimarkinde, ke tiun de 1929 ĉeestis pli da velŝipoj ol da ili ĉeestis tiujn de *Nice*, *Cowes*, *Kiel*.


La ĉasamanto povas tutplene kontentigi ĉar proksime de la urbo li trovas lokon kun densaj primitivaj arbaroj, en kiuj li ĉasos, aprojn, lupojn, vulpojn, eĉ ursojn inufoje (kompreneble, leporojn, kuniklojn, perdikojn kaj aliajn ĉasotaĵojn). La vilaĝanoj estas ĝentilaj, afablaj, grandanimaj, agrablaj, bonedukitaj, kaj ili havas koran sintenadon al ĉiuj, kaj tial ke la teritorio estas tre loĝata, ekskursanto ĉiam kaj ĉie trovas domojn, bonajn manĝaĵojn eĉ agrablan restadejon.



### INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

La Internacia Universitato de Santander estas fondita de la Hispana Respubliko pro iniciato de la ministro de Publika Instruado, S-ro Ferdinando de los Ríos, kaj ĝi celas dum tempodaŭro de dek semajnoj kunvenigi profesorojn kaj studentojn hispanajn kaj fremdajn, kiuj efektigos komunan programon el studoj kaj akcelos, per sia kunvivado, rilatojn de solidereco kaj kamaradeco inter personoj el diversaj popoloj,

kiuj sin dediĉadas al intelekta laboro. La Internacia Universitato vokos al siaj aŭloj la plej eminentajn profesorojn de la hispanaj Universitatoj, kaj por aŭdi iliajn instruojn alkuros pli ol ducent universitataj studentoj hispanaj. Tiel oni liveros al fremduloj okazon unikan por kontaktiĝi rekte kun la aŭtentika hispana vivo universitata dum tempo kiam ĉiuj Univer-



Internacia Somera Universitato. Santander. (Foto Samot.)

sitatoj de la Respubliko same, kiel tiuj de la aliaj landoj estas fermataj pro la somera libertempo.

Santander estas la sola elirejo de Kastilio al la maro, kun bonegaj plaĝoj kaj belegaj naturajoj, kun trankvila medio; ĝi estas centro al ekskursoj intereseĝaj de la historia kaj arta vidpunktoj, kaj ĉio faras Santander'on plej konvena kaj mirinda somerrestadejo kaj samtempe Internacia Universitato.

## INSTALO

La Registaro de la Respubliko cedis al ĉi tiu celo la preskaŭinsuleton kaj palacon de la Magdalena, antaŭa somerrestadejo de la reĝa familio. La palaco




Palaco de la Internacia Somera Universitato vidita de aeroplano. Santander. (Foto Samot.)

situas du kilometrojn de Santander, en la supro de la preskaŭinsulo, de kie oni povas admiri la maron kaj la montarojn, mirindajn panoramojn nekompareblajn. En la preskaŭinsulo staras la palaco kaj aliaj konstruaĵoj, estas densaj pinarbaroj, plaĝo, enŝipiĝejo kaj arenoj por ludi piedpilkon kaj tenison. La aŭloj kaj loĝejoj estas instalitaj en la palaco kaj najbara konstruaĵoj.



## INSTRUOJ

La somera Internacia Universitato, krom la ĝeneralaj kursoj pri diversaj sciencaj kaj literaturaj celoj por la hispanaj studentoj (kiujn tamen povos partopreni la fremdaj studentoj laŭ propra deziro), prenis sur sin la kurson por fremduloj, kiun de kelkaj jaroj organizadis la Societo Menéndez y Pelayo, kaj kiu



La Stonego traborita. Santander.

estas tute sendependa kaj aŭtonoma de la aliaj kursoj, kaj kies funkciado estas de la 1<sup>a</sup> de aŭgusto ĝis la 30<sup>a</sup> de la sama monato de 1933 kaj same certe ĉiujare.

Ĉiutagaj praktikaj lecionoj al malgrandaj grupoj el lernantoj sub gvidado de spertaj profesoroj, pri : *Prononcado, Vortfarado kaj Komentario al modernaj tekstoj.*

La Urbeŝtaro de Santander, en rilato kun la Universitato, dum la kurso, organizos serion da festoj : prezentadon de klasikaj teatraĵoj, koncertojn, recitadojn, artajn ekspoziciojn, ktp., ktp.

## A TESTOJ

La studentoj, laŭ pruvoj precizaj, povos havigi al si atestojn pri ĉeestado, pri kapableco, pri kreditigo.



En la kampo por teniso.

## PAGOJ

Enskribigo, kun rajto profiti ĉiujn instruojn de la kurso por fremduloj, 160 pesetojn. Pagante malgrandan sumon, kiel suplementon, la studentoj povos fari la ĝeneralajn kursojn de la Universitato.

Atesto pri kapableco aŭ kreditigo, 10 pesetojn.

Atesto pri ĉeestado, 5 pesetojn.

### GASTIGADO

Malgranda nombro da fremdaj studentoj povos loĝi en la Palacio kaj Restadejo de la Magdalena. Kompletaj pensio en la Magdalena : 14 al 17 pesetoj por persono kaj tago.



Kompletaj pensio en hoteloj kaj gastejoj de la urbo, estas de 10 al 20 pesetoj.

Por rezervi ĉambro en la Magdalena estas nepre necese antaŭavizi kaj sendi, 25 pesetojn.

### INFORMADO

Por peti programojn, detalaĵojn, enskribojn kaj ĉiajn informojn, bonvolu vin turni al ĝenerala Sekretario de la Internacia Somera Universitato en Santander : Strato *Medinaceli*, n-ro. 4. *Madrid (Hispanio)*. De la 1<sup>a</sup> de julio, al palaco de la Magdalena. *Santander*.


Ĉiujare funkciados la Internacia Somera Universitato laŭ programoj ĝustatempe publikigitaj.



Kanonika - Preĝejo. Santillana.

## SANTILLANA DEL MAR


**L**A unua impresio kaŭzata de ĉi tiu urbeto estas neforgesebla, ĉar en aliaj historiaj urboj, la restsignoj de la pasinteco estas disigitaj, fragmentigitaj, ĉu ĉe iu monumento, ĉu ĉe iu strato aŭ



Santillana vidita de aeroplano. (Foto Samot.)

placo, ĉu ĉe tuta kvartalo, ĉu ĉe la perspektiva silueto de l' domaro; sed ĉiam apud ili aperas ĉio pri la triumfantaj modernaj, kiuj kvazaŭ maldolĉigas la

ĝuon, la plezuron al rigardado de la allogantaj antikvajoj parolantaj sentige al la animo, kaj ĉi tio ne okazas pri *Santillana del Mar*, kiu estas verŝajne elvoko de la pasinteco sen difekto, tutplene, tiamaniere, ke la vizitanto, promenante tra la stratoj inter palacoj kaj domoj kun ŝildoj kredas sin vivanta en la Mezepoko,



Ĉe Santillana. (Foto Samot.)

el kies revo eltiras lin la renkontiĝo kun alia trairanto de la XX<sup>a</sup> jarcento. Jen, do, la granda ĉarmo de *Santillana del Mar*, kiu estas kvazaŭ persistanta ŝtonpoemo el belega plenarta interesa *Kanonika Preĝejo*, el tipaj palacoj, domoj kaj turoj. Proksime de ĝi estas la tutmondfamaj *Grottoj de Altamira*.

Je 30 km. de *Santander* kaj 7 km. Nordokcidenten-

ten de *Torrelavega*, ĉe la fundo de valo ĉirkaŭata de altanoj, proksime de la marbordo, staras *Santillana del Mar*, kun milda klimato regule malseka.

La historio de Santillana perdiĝas en la pasintecon, devenante ĝia nomo, laŭ tradicio, de la nomo de martirino *Sankta Ilana*. De la V<sup>a</sup> jarcento al la VIII<sup>a</sup>,



Placo de Santillana.

la loko graviĝadis, kaj konsekvence oni alnomis de tiam la regionon *Asturias de Santillana* por diferencigi ĉi tiun regioneton de la najbaraj *Asturias de Oviedo*. La regionon formis naŭ valoj, kiuj grupiĝis politike de tiam ĝis la komenco de la XIX<sup>a</sup> jarcento. Antaŭ la IX<sup>a</sup> jarcento staris tie tre potenca monaĥejo, ĉirkaŭ kiu, dum la XI<sup>a</sup> jarcento, stariĝadis la gravega

urbeto. La reĝo Ferdinando I<sup>o</sup>, je 1045 donis al ĝi privilegion, leĝon.


Ju pli la tempo pasis despli graviĝis la urbeto per novaj privilegioj, kaj la monaĥejo fariĝis Kanonika Preĝejo. Je 1209, Alfonso VIII<sup>o</sup> decidis por la abato kaj kanonikaro rajtojn mastrumi por ĉiam la urbeton,



Strato de Santillana. (Foto Samot.)

kiu mirinde prosperadis multe dank' al novaj privilegioj; je 1302 kaj 1304. Supozita rajtigo, donita de Alfonso XI<sup>o</sup>, al *Gonzalo Ruiz de la Vega* por mastrumi kaj regadi la regioneton *Asturias de Santillana*, naskis luktadon inter la nobelo kaj la abato, kun partopreno de la reĝa juĝisto, kaj kun okazigo de bataloj. Dum la malfeliĉaj tempoj por Kastilio, regante ĉi tiun Henriko IV<sup>o</sup>, kies reĝan povon konstante atakis


fieraj kaj ribelemaj nobeloj, estis *Don Iñigo López de Mendoza*, filo de *Doña Leonor de la Vega*, heredintino de la supozita rajtigo, la unua *Markizo de Santillana*, je 1445; kaj kvankam li okupis perforte



Kanonika preĝejo de Santillana. Nacia Monumento.

la urbeton iun fojon, oni ne konsentis lian mastrumadon kaj regadon.

*Don Iñigo López de Mendoza* estas unu el plej rimarkindaj figuroj de la hispana literaturo, samtempe sperta sciencisto kaj laŭ opinioj eĉ magiisto kaj ensorĉisto. Estas tre famaj liaj *Montarĉoj* (*Serranillas*), el kiuj jen la IX<sup>a</sup>:



Ronda turo de la Kanonika - Preĝejo. Santillana.

## IX<sup>a</sup> MONTARPOEMO

DE L'

### Markizo de Santillana

Fraŭlino de *Bor'o* (1),  
Al mi ĉe *La Lam'o* (2),  
Vidigis Amoro.

#### I

Mi kredis: libera,  
Amoro min lasis,  
Ĉar tempo forpasis  
Sen io sufera  
Pro ama doloro,  
En kies la flamo  
Bruliĝas la koro.

#### II

Majesta, gracila  
Tutplene la pozo;  
Vizaĝo laŭ rozo  
Tre freŝa kaj brila,  
Kun ĉarma koloro  
Plej bela de l' gamo,  
La sola, sinjoro.

#### III

—Fraŭlino, pro tio  
(Mi diras), jen celo:  
Pro ŝia la belo,  
Eliru al scio  
Plej bela la floro;

Konigu ĝin famo  
Per laŭdo kaj gloro.

#### IV

Jen ŝi: —Kavaliro,  
Nun lasu la vojon  
Libera, ĉi fojon,  
Al mia la iro.  
Min celas, sinjoro,  
Paŝistoj de *Fram'o* (3)  
Kun nobla la koro.

#### V

—Paŝista jam estu,  
Do, mia la rolo;  
Laŭ via la volo,  
Por ĉiam mi restu;  
Pli rava sonoro  
Ja estos de l' *bram'o* (4)  
Ol najtingalhoru.—

#### VI


Dialogon ni finis;  
Kaj estis plezuro  
En ĝusta mezuro;  
Konsento nin klinis.  
Ateŝis nur floro  
Apud *Espinam'o* (5),  
Ĉiel' kaj Amoro.

(1), (2), (3), (5) Nomoj de vilaĝoj kaj vilaĝetoj.

(4) Delikata malgranda stiplo rektangula, iomete longa, tre mallarĝa rilate la longeco, maldika, traborita ĉe la centro de unu el la ekstretoj, por ligi ĝin al ŝnureto proksimume unu metron longa, por rotacii ĝin rapide kaj produkti bruon similan je tiu de la vento; kiun ankaŭ uzas la paŝistoj por gvidi la brutarojn.

La pacon ne trafis la urbeto ĝis la regado de Filipo II<sup>a</sup>.

Nobela estas la karaktero de la urbeto, ĝia arki-




Granda altaro, kun arĝenta antipendio de la altartablo.

(Kan.-Preĝ. Santillana.)

tekturo estas tre tipa, kun palacoj kaj domoj el teretaĝo kaj ĉefetaĝo, kaj en ĉi tiu elvidiĝas tre elstaranta balkono el la fasadoj. Ĉiuj domoj prezentas en siaj fasadoj ŝildojn kun devizoj, inter ĉi tiuj jen: «Oferu

la vivon al honoro; la honoron al la animo.» Estas rimarkindaj la *Palaco de Barreda*, kun interesa biblioteko el antikvaj libroj, la supozita *Palaco de l'*




Primitiva antipendio de la altartablo de la granda altaro, kiun kovras la argenta tre arta kovrilo. (Kan.-Preĝ. *Santillana*.)

*Markizo de Santillana*; la domo *de la Villas*, tiuj de la *Borjas*, *Velarde*, *Sánchez de Tagle*, *Bustamante* kaj *Hoyo*; kaj fine la *Turo de l' Merino* (*Reĝa Juĝisto*), de kies kreneloj, la *Reĝa Juĝisto* (*Merino*) *Don*

*Gonzalo de Barreda* ordonis mortpendigi la ambasadoron de la *Markizo de Santillana* dum unu el tiuj luktadoj. Konsekvence estas tre tipaj la stratoj de la urbeta.

La plej grava monumento de Santillana estas la Kanonika Preĝejo (*Colegiata - Koleĥiata*), ĉar ĝi estas unu el plej belaj romanstilaj konstruaĵoj de la regiono. Oni rekonstruis ĝin dum la fino de la XII<sup>a</sup>




Detalaĵo de la granda altaro. (*Santillana*.)

jarcento, kaj je tiu tempo oni starigis la flankajn navojn. Dum modernaj tempoj oni rekonstruis ĝiajn ĉefan portalon kaj eksterajon. Ĝi posedas tre purajn artvalorajn elementojn kaj ornamaĵojn, kiuj estas intereseĝaj de la konstrua vidpunkto: ĝi havas tri navojn kun tri respektivaj absidoj duoncirklaĵ, kun mallonga transepto. Ĉe la piedo de la preĝejo, tute laŭlarĝe de la centra navo, staras la turo, tre masiva kaj kvadrata, preskaŭ tiel alta kiel la kupolo de l' transepto, kiu

estas la plej interesa parto de la preĝejo pro siaj specialaj karakterizoj kaj konstruosistemo.

La kurba plafono de la brakoj de la transepto estas duoncirkla, tiu de la navoj prezentas nervojn. La



Rimarkinda dekstra flanko de la presbiterejo. (Kan.-Preĝ. *Santillana*.)


ĉefa portalo estas pure romanstila sed tre difektita bedaŭrinde ĉar ĝi estis tre riĉa laŭ siaj restaĵoj. En la supra parto estas aldonadoj de la XIV<sup>a</sup> kaj XVII<sup>a</sup> jarcentoj.



Klaŭstro de la Kanonika Preĝejo de *Santillana*.



La absido de la epistola navo estas rimarkindega. Interesaj estas : la tomboj de la martirino iam en la centro de la preĝejo kaj alia kun du grandaj leonoj apud absido de la dekstra flanko ; la grandaltaro kun statuoj de kvar apostoloj, unu el ili estas Sankta Petro tenante alten librojn. Ne tiel meritplenaj estas la statuoj de la evangeliistoj kaj la pentraĵoj sur ligno an-



Kapitelo. *Santillana*.

kaŭ de la grandaltaro, sed tamen estas interesaj kaj atentindaj.


Kvankam la kapiteloj de la preĝejo estas rimarkindaj, prezentante vivoplenajn scenojn ; tamen estas vera juvelaro la serio el kapiteloj de la Klaŭstro, kiu estas unu el plej belaj de sia epoko, komenco de la XIII<sup>a</sup> jarcento kun iuj aldonadoj de la XV<sup>a</sup> : sur seninterrompa bazo staras kolonoj surportante arkaĵoj

KANONIKA - PREĜEJO DE *SANTILLANA*



Kapiteloj de l' Klaŭstro.

preskaŭ duoncirklaĵ; foĵojn grupojn el kvin kolonoj fortikigas la arkajaron. La kapitelaro estas rimar-




Angulo de la galerioj de l' Klaŭstro. *Santillana*.

kindega ĉefverko de la skulptarto pro sia floraro, bestaro kaj scenaro plenaj je vivo. En la korto de la klaŭstro estas iuj tomboj.




KANONIKA - PREGEJO DE *SANTILLANA*




Vidajo de l' Klaŭstro.

KANONIKA - PREGEJO DE SANTILLANA




Galerio de la Klaüstro.

KANONIKA - PREGEJO DE SANTILLANA



Detalajo de l' Klaüstro.


KANONIKA - PREĜEJO DE *SANTILLANA*



Tre antikvaj meritplenaj skulptitaĵoj.




Rimarkinda tomo.



Turo de 1<sup>o</sup> Merino. *Santillana*.

## GROTOJ DE ALTAMIRA

**F**u pli la tempo pasas des pli kreskadas famo de la grotoj prahistoriaj de *Altamira*, kaj estas rimarkiginde konstati, ke la eminenta profesoro S-re. Hugo Obermaier estas tiu, kiu plej disvastigis tiun famon per siaj studoj, verkoj, paroladoj,




Prahistoria pentraĵo. Apro.

k. t. p., pri la grotoj, el kiuj oni elĉerpis ĉi tiun tekston. Li, precipe, faris sinsekvajn novajn studojn kaj aktivan laboron por diskonigi la grotojn kaj ilian valoron de la scienca prahistoria vidpunkto; sed ankaŭ aliaj eminentuloj kaj organizadoj agadis kaj agadas al tiu celo. Jen kial oni uzas esperanton por ankoraŭ pli disvastigi la scion pri ĉi tiuj mirindaj rifuĝejoj de

la diluva epoko, kies valoro estas unika en la mondo, ĉar ili konservas mirigantajn elmontraĵojn pri tre prahistoria arto en kompleta matureco de antaŭ 20.000-15.000 jaroj.

Sub direktado de la eminenta profesoro aludita, dum kelkaj someroj, oni elfosadis en la apudaĵoj de la groto de Altamira kaj en la kvazaŭ vestiblo de ĉi tiu groto; kaj la elfosaĵoj liveris amason el fosilioj kon-




Prahistoria pentraĵo. Cervo.

sistantan el tavoloj de la diluva epoko: la fosiliejo estas dika je tri metroj, sed la fosilioj apartenas al diversaj civilizacioj tute malsamaj unuj de aliaj. Oni opinias, ke kvardeknul jarojn antaŭ Kristo, vagadis tra la lokoj, kie staras la monto en kies internaĵo estas la groto de la pentraĵoj, nemultenombraj triboj, kiuj profitis la groton kiel rifuĝejon: armiloj kaj variaĵoj el kvarco—hakiloj, pintoj de lanco, krudaj tranĉiloj, k. c.—kuŝas amase ĉe la diluva argilo de la ĉirkaŭaĵoj de la groto, kaj la kvarcaĵoj estas samtipaj

kiaj tiaj de la najbaraj grotoj de *Puente Viesgo* (kie oni faris plej gravajn elfosaĵojn de Eŭropo rilate al ĉi tiu celo, kiuj liveris abundegan amason el ĉasrestaĵoj).


La homo de tiu malproksima periodo ĉasadis precipe elefantojn altajn pli ol kvar metrojn, rinocerojn kun nuda felo, pruvo nerifutebla pri la tiama varmeta klimato, kiel tiu de Afriko.



Prahistoria pentraĵo. Biso.

Pri la fizika aspekto de ĉi tiuj prahistoriaj loĝantoj praktikantaj ĉefe la ĉasadon per maskitaj fosaĵoj kaj terurigante la bestaron ĉiel por ĝin enpuŝi al loko difinita por ĝin ĉasi, instruas nin serio el skeletaĵoj trovitaj en Francujo, Germanujo, Belgujo kaj Kroatujo. La tiama homo, nomata de *Neandertal*, estis celo al detalegaj anatomiaj kaj antropologiaj studadoj permesantaj reprezenti al ni tute bone tiun homan tipon : sur sufiĉe mallongaj kruroj, sed tre fortaj, balanciĝadis dika forta mallonga trunko, surportante mallongan

kolon kun granda kapo ; en tute li estis alta je unu metro sesdek centimetroj proksimume. Ĉi tiu fosilia homo diferencas rimarkinde el sekvintaj kaŭze de la formo de la kapo : la krania skatolo aŭ cerbujo estas granda kun dika ostoj, sed ĝin karakterizas precipe, ĉefe : ĝia malalta volbo kaj plata frunto kliniĝanta tro malantaŭen ; la du dikaj brovarkoj formis kvazaŭ neinterrompitan arkon solan supren la okulkaŭzoj gran-




Prahistoria pentraĵo. Biso.

daj kaj preskaŭ rondaj ; la suba makzelo tre forta kaj dika, al kiu mankis la elstaranta mentono, kiu disvolviĝadis poste, sed kies deirpunkton oni jam rimarkas precize en ĉi tiuj fosilioj.

Nenion pozitivan oni povas diri pri la triboj vizitantaj *Altamira'n* post la lastaj loĝantoj de la pridirita epoko, ĉar, kiam oni retrovas en tiu loko homrestaĵojn, malfacile estas precizigi pro la tute radikala ŝanĝo suferita de ĉi tiu terpeco.

De la altegaj pintoj de la *Kantabra Montaro* subentendiĝis imponaj glaciriveroj, respektante nur la deklivan bordon apud la maro, kiu estis kvazaŭ mARBORDA teritorio proponanta al homo vivrimedojn kaj loĝejeblecon. Malriĉa kreskajaro, simila je tiu de la suda Skandinavio, ĉefe el pinarbaretoj disvolviĝantaj dum la mallonga somero, kaj apenaŭ rezistantaj la longan kaj teruran vintron.




Prahistoria pentraĵo. Biso.

La faŭno estis el mamutoj kaj rinoceroj kies felojn ŝirmis abundega kvazaŭ lano kontraŭ la intensa frostotemperaturo; el norda-cervoj, venintaj de la Norda Eŭropo, el ĉamo, el sovaĝaj kaproj kaj specialaj indiĝenaj kaproj hispanaj kaj el marmotoj, ĉiuj elpelitaj de la glacio el la montaro al la subaj partoj. En la densa kreskajaro loĝis la sovaĝa ĉevalo kun tre hirtaj haroj, la bisono, la komuna kaj giganta cervoj, kaj la apro; kies grandaj malamikoj estis la leono, la urso kaj la hieno. Samtempa estis homo tute malsama je

tiu antaŭe priskribita, sed tre simila je la nuna eŭropido laŭ la fizika aspekto: la homo *Cro-Magnon*.

Se, je tiu dato, 20.000 - 15 j. a. K., ni alproksimiĝus al *Allamira*, ni vidus malmultenombrajn familiarojn utiligantajn, kiel se ĝi estus hejmo, la antaŭgrotan aŭ vestiblon de la fama groto.

Dank' al lastaj elfosaĵoj de S-ro. Obermaier, oni povis fari liston el animaloj tiamaj ĉe tiu ĉi loko, ĉar la elfosaĵoj liveris eburajn restaĵojn de mamuto tri




Prahistoria pentraĵo. Biso.

metrojn alta, ostajojn de bisono, de taŭro kaj de ĉevalo sovaĝaj, de aproj, de lupoj, de sovaĝaj kaproj, de nordaj cervoj kaj fokoj de Groenlandio. Ankaŭ la elfosaĵoj liveris grandajn seriojn el akraj pintoj ostaj tre delikate prilaboritaj kaj ankaŭ faritaj el cerva korno; liveris multenombrajn pikilojn aŭ traborilojn pli-malpli grandajn, tre delikatajn kudrilojn por ornami, utiligante ĉevalharojn kaj delikatajn tendenojn; kvarecajn mallargajn kaj akrajn tranĉilojn. Certe la trogloditoj

konis la pafarkon kaj sagon pro la akrepintaj kvarcaĵoj laŭ formo de laŭra folio por armi la sagojn. Ankaŭ oni trovis malgrandajn ornamaĵojn, kiuj konsistas el traboritaj dentoj kaj el maldikaj diskoj eburaj kun gravurita ornamaĵo, kvazaŭ tiamajn juvelojn, kiuj samtempe estis amuletoj, talismanoj al feliĉo.

Sed des pli interesege estas konstati, ke la troglo-




Internaĵo de la groto.

ditoj havis grandan kaj gravan artsenton, ĉar ili postlasis al ni en la internaĵo de la groto superegajn verkojn de tiu epoko malproksimega, kiuj estas la plej mirigantaj de la tuta mondo kaj famigantaj *Altamira'n*.

Oni ne okupadis konstante la groton, ĉar la tiamaj ĉasistoj ofte translokiĝadis, sed de tempo al tempo ĝin


## GROTOJ DE ALTAMIRA



Porto de la Groto. Supren obelisko je la memoro de Marcelino S. de Sautuola.



utiligis, ĝis kiam granda geologia katastrofo ŝtopis la enirejon. Antaŭ ol finiĝi la longa malvarmega periodo kaj glacia invado, la plafono de la grotopordo renversigis grandparte; la ruboj kovris la *«habitato»* kaj fermis tiel komplete la trairejon al la interna groto, ke jam, de post la renversiĝo neniu eĉ povis suspekti ĝian ekziston. Tiamaniere ĝi restadis kaŝite dum milj-




El la nove elkaŝita groto je 1928.


aradoj, kaj ĝiaj mirindaj pentraĵoj, dum tiel longa periodo, estis en konstanta nokto, feliĉa ĉirkonstanco al kiu ni ŝuldas ilian bonan konservadon.

Je 1868, hundo de ĉasisto eniris kaj perdiĝis tra la kavaĵoj inter la rokoj, kaj ĉi tio devigis la ĉasiston atenti pri la hundo kaj ekkoni pri la groto.

Je 1875, la klera santanderido Marcelino S. de



El la nove elkaŝita groto. 1928.



El la nove elkaŝita groto je 1928.

Sautuola, tre ema je la prahistoriaj studoj, reveninte de Parizo, okaze de Universala Ekspozicio, influite de la grandaj kaj gravaj paleontologiaĵoj, kiujn li admiris en la franca ĉefurbo, decidis esplori la kavernojn de sia terpeco. Tagon, ĉe la groto de Altamira, li vane esploradis, sed lia filino, tirate de sia infana kuriozemo, vekis la atenton de la patro al desegnoj de la volbo, kiujn ŝi vidis. Sautuola levis la rigardon kaj, lumigante la volbon per sia lanterno, restis en kompleta miro ne kredante realaj la mirindajn pentraĵojn vidatajn de li. Tuj li ekkonis la eltrovitajn, kaj la novaĵo flugis ĉien, trafante atenton de tutmonda sciularo, el kiu multenombraj eminentuloj alkuris al la groto por studi la mirindaĵojn; sed post kelke da tempo eĉ oni disigis opiniojn pri neaŭtentikeco de la pentraĵoj tiamaniere ke la kompetentega sciulo Cartailac eĉ diris: «Verŝajne Santander perdis la rajton esti fiera posedi ĉefan monumeton por la historio de la arto kaj de la homa spirito». Tamen, post kelkaj jaroj oni restarigis la arkeologian valoron de la pentraĵoj, kaj multenombraj eminentaj sciuloj denove vizitis la groton konstatante la aŭtentikecon de la pentraĵoj. El tiuj eminentuloj estas citindaj, krom Obermaier, la hispanaj Vilanova, Alcalde del Río kaj Carballo; la francaj Harlé, Reinach, Regnault kaj Breuil, kaj la princo Alberto P de Monako, kiu, el sia mono, pagis la reproduktadon de la pentraĵoj por ilustriti multenombrajn tekstojn kaj libron eldonitan de Cartailac kaj la abato Breuil, kiu faris la kolorigitajn desegnojn.

Je 1925, oni nomis komitaton por la konservado de la groto, kaj tuj oni faris laborojn por ĉio necesa al la konservado kaj vizito, kaj por instalo de muzeo. Je 1927 jam ĉio estis en tute bona stato por viziti la groton. Laŭ Obermaier la tekniko de la prapentristoj estis mirinda, ili fluidigis la koloraĵojn per sero el

sango aŭ per graso, sin lumigante per lampoj el konko aŭ el atenteme kavigita ŝtono, kiujn ili nutris el animala graso.

La duan groton oni malkaŝis je 1928, kiam oni konstruis la ŝoseon por aliri al la unua. En la muzeo estas la skeleto de la homo pereinta je la unua renversigo ŝtopinta la enirejon.

Stalaktitoj, stalagmitoj, kolonoj, kolonaroj, mirindaj laboritaĵoj de la akvo dum pasado de miljaradoj, estas ĉie ĉe la grotoj konstanta altiro kaj mirigo. La pentraĵoj meritigis la groton por ĝin alnomi «*Sikstina Kapelo*» de la prahistoria pentrarto. La manoj de la prahistoriaj pentristoj estis tre firmaj kaj spertaj por doni al la pentraĵoj la plej grandan perfektecon de la desegna kaj absolute realisma vidpunktoj; tiel firmaj kaj spertaj, kiel tiuj de la tutmond fama geniulo de la pentrarto, de la senmorta Goya (Goja), kaj oni povas konstati, do, ke «da ekstremoj tuŝas unu la alian».

## ALIAJ GROTOJ

Santander etsas abunda je prahistoriaj grotoj rimarkindaj, ĉi tiuj estas pli ol dekdu; kaj tial, verŝajne oni povas konjekti, ke prahomej elektis la teritorion por postlasi al ni etnografiaĵojn por scii pri ili.

El la grotoj, estas tre rimarkinda tiu de l' *Castillo*, de Puente Viego, ankaŭ kun pentraĵoj: la groto situacias ĉe la mezo de alta monto; ĝi entenas grandajn ŝtonigitajn kaskadojn, grandiozajn kolonojn, stalaktitojn kun multenombraj ornamaĵoj delikataj kaj kun diverskoloraj reflektoj. De ĉi tiu groto, pro ne atentemo kaj malvigleco, oni forprenis amason el altvaloraj prahomaĵoj. La enirejo estas grandega; sekve estas profunda kaj vaste ga kvazaŭ salono, en kiu elvidiĝas multenombraj ruĝaj signoj ankoraŭ misteraj ĉar oni

ne deĉifris ilin, kvankam la sciuloj konscias ilin magiaj. La alteco de la kaverno estas impona; flanken estas abismoj kaj kolonaroj apud kiuj la vizitantoj estas kvazaŭ gnomoj. Proksima, ĉe la sama monto, estas alia groto kun tre malfacila enirejo kaj pentraĵoj similstilaj de tiuj de Altamira, kaj oni nomas ĝin *Pasiega*.


La groto de *El Pendo* estas pli proksima al Santander (urbo), en la valo *Camargo*, kies volbo estas 80 m. longa kaj 45 m. larĝa sen ia ajn apogilo, pro kio la kavaĵo estas impona. En ĝi oni trovis la plej perfektajn ĉizitaĵojn kaj gravuraĵojn prahistoriajn de Eŭropo, same la famajn «*komandbastonojn*», kiujn oni povas admiri en la Prahistoria Muzeo de Santander, kies valoro estas multe pli supera ol tiu de la «*komandbastonoj*» de Francujo. En la sama valo estas la groto *Santián*, malgranda sed rimarkinda juvelo el kolonetoj kaj brilantaj rokkristalaĵoj de la muroj kaj volbo kvazaŭ grandioza filigrano ensorĉanta.

En *Ramales*, pitoreska vilaĝo ĉe la rivero *Asón*, estas alia groto nomita *Cullalvera*, kies finon neniu ankoraŭ trafis; ĝi estas eble la plej longa de Hispanujo kaj eble de Eŭropo. De la vidpunkto prahistoria ne estas vizitinda, sed jes de la vidpunkto turisma, ĉar ĝi prezentas ĉie mirigantajn vidaĵojn. Rivero trairas la groton. Ankaŭ estas citindaj la grotoj de *Covalanas*, proksime de *Lanestosa*, *Santa Isabel* kaj *Fuente de V Francés*.



## ALIAJ PRAHISTORIAJ MONUMENTOJ

Ankaŭ estas gravaj monumentoj la *Dolmeno de V' Abra* aŭ de *Peña Labra* (*Penja=Stonego*), je 2.002 metroj sur la mara nivelo; la *balanciĝantaj ŝtonoj* (granda kaj malgranda) de *Boariza*, sur la vojo de *Reinosa* al *Liébana*: la unua estas grandega kruda bloko



Dolmeno de *Abra*.

granita, aŭ plibone el konglomerato konsistanta el grandaj kaj malgrandetaj rulintaj ŝtonoj, kiu mirinde ekvilibre staras sur pinto de alispeca ŝtono konusforma; la dua estas malpli granda kaj preskaŭ najbara de la unua, nordokcidenten de ĉi tiu. Oni opinias, ke ili estas keltaj monumentoj. Ankaŭ estas la menhiroj de *Peñona de Izara* kaj de *Peña-Larga* proksime de *Reinosa*.



## ARKITEKTURAĴOJ


**R**IMARKINDAJ estas iuj preĝejoj starigitaj dum la XII<sup>a</sup> kaj XIII<sup>a</sup> jarcentoj kaj kvankam ĉiuj apartenas al sama tipa stilo romana, ĉiu el ili havas ion partikularan.

La plej malnova estas tiu de *Lebeña*, ĉar oni opinias, ke ĝi estas starigita dum la mezo de la X<sup>a</sup> jarcento. Ĝi konsistas el tri navoj, kies arkaĵoj estas surportataj de pilastroj kun aldonitaj kolonoj; la absidoj estas kvadrataj; la volboj estas duoncirkklaj.

Proksimume de la sama dato devenas la primitiva preĝejo de *Piasca*, kiu preskaŭ tute estis anstataŭata de la nuna, kiun oni povas plengue admiri. Tre rimarkinda estas la ĉefa portalo, prezentante tri belegajn niĉojn kun statuoj kaj rimarkindan pordon. La absido havas tri korpojn kun ogiva fenestro same kiel aliaj ĝiaj partoj. Ekstere estas tre rimarkinda riĉega serio el elstarantaj apogiloj aŭ surpotiloj de la kornico, sur kiu estis la primitiva tegmento, sed nun surportanta plialtiĝintan muron senartan. En la internaĵo restas ankoraŭ iuj tre interesaj kapiteloj.

Oni opinias, ke la gracia kaj bela preĝejo de *Cervatos* devenas de la komenco de la XIII<sup>a</sup> jarcento. Ĝi estas belega monumento kun eleganta absido el du korpoj, aŭ entablementoj, la unua kun apogantaj muroj dividantaj la absidon laŭ tri partoj kun fenestro ĉiu respektiva parto; sur la apogantaj muroj staras kolonoj, kaj la tegmento ripozas sur serio el elstarantaj groteskaj apogiloj primitive laboritaj. Tre rimarkin-

da estas la pordo el sep arkaĵoj kun lintelo kaj frontono bele ornamitaj same, sed inter ili estas skulptitaj



Malnova kanonika preĝejo de *Castañeda*.

taŭroj aŭ leonoj atakantaj unu la alian. La absido, kies volbo estas forna, havas belan arkadaron, kies

kolonoj havas malsamajn kapitulojn. Ankaŭ estas interesa la turo kun tri blindaj arkadoj en la dua korpo. Oni povas rimarki, ke sendube oni pensis fari ĝin pli alta ol ĝi estas.


La plej malgranda el la romanstilaj preĝejoj de la



Detalajo. Preĝejo de *Castañeda*.


regiono estas tiu de *Bolmir*, kies tipa karakterizo estas la longigita absido, kvazaŭ ĝi estus estinta la sola primitiva preĝejo; saman absidon prezentas la preĝejo de *Villacantid*.

La preĝejo de *Retortillo*, apud *Bolmir*, havas unu solan longigitan navon elegantan kun sufiĉe alta volbo



Preĝejo de *Torrelavega*.

postulanta eksterajn subtenantajn murojn aŭ pilastrojn. La pordo estis ĉe la okcidenta fasado, laŭ postulis la rito, sed, pro la naturaj cirkonstancoj de la regiono, oni malfermis modestan pordon en la suda fasado, sur kiu elvidiĝas reliefon kun stranga desegno. La internaj pilastroj korespondantaj kun la eksteraj subtenantaj havas aldonitajn kolonojn. Interne, la absido prezentas tre artan disvolvon elegantan kaj




Tombo de l' abato Munio. Castañeda.

gracian de la arkadaro, kaj tri rondajn fenestrojn el kiuj la flankaj estas blindaj.

Eble samepoka de la preĝejo de *Cervatos* estas tiu de *San Martín de Elines*, sed ne tiel interesa. Ĝia ĉefa tipa karakterizo estas la ronda turo.

Interesega estas la preĝejo de *Silió*, tre alta, kun tri absidoj. Eble ĝi estas de la XII<sup>a</sup> jarcento laŭ atestas ĝia okcidenta pordo; la suda pordo estas klasika. En la internaĵo ankoraŭ restas iuj rimarkindaj laboritaĵoj, kaj en la vestiblo du interesaj tomboj de la XV<sup>a</sup> jarcento.



Internaĵo de la preĝejo de *Castro-Urdiales*.

Je la XIII<sup>a</sup> jarcento oni starigis la preĝejon de *Santa María de Yermo*, kiu nun prezentas el la primitiva konstruaĵo nur parton de la absido kaj la pordon kun tre interesa altreliefo en la du supraĵoj de la plata ŝtono.

La preĝejo de *Castañeda* estas rimarkinda, unu el la plej antikvaj de la regiono, kaj kiu plej komplete konserviĝas; ĝi estas tiel aspekta kiel tiu de *Lebeña*




Baptoakvujo. Rimarkinda antikvega juvelo.

konceerne la elegantecon internan kaj eksteran; ĝi vidigas eksteren la tranĉitajn angulojn en la kruciĝo de la navo kun la transepto. Estas tre rimarkinda la kvazaŭ sfera volbo aŭ kupolo de tiu kruciĝo, ĉar la kupolo ne estas apogata de nervoj, sed de sola ŝtono centra sur la lasta ringo de la serio el ringoj unu sur la alian ĉiufoje kun plej malgranda diametro form-

antaj la kupolon. La arkaĵoj de la flankaj navoj, de la transepto al la piedo de la preĝejo, estas multe pli malaltaj. Interne, la absido ankaŭ havas sube ornamitan arkadaron.

El la primitiva preĝejo de *Santa María de Cayón* nur restas la absido.

La preĝejo de *San Vicente de la Barquera* primitive nur konsistis el unu sola navo, kaj eble ĝi estas la unua el la romanstilaj. La nuna preĝejo konservas tiun primivan navon, kiu estas la centra ĝis la tran-



Kastelo. *Puente Agüero*.

septo, kaj ankaŭ la okcidentan pordon, kiu prezentas tre interesan partikularaĵon, reliefon prezentantan ree la ŝildon de la urbeto, kaj kiu estas kastelo sur ponto, kaj kiu ankaŭ aperas en la kvadrata supraĵo de kapitelo de la dekstra flanko. Je la XIII<sup>a</sup> jarcento oni aldonis la flankajn navojn kaj la sudan pordon; je la XIV<sup>a</sup> jarcento oni transformis ĝin ogive; je la XVI<sup>a</sup>, oni longigis ĝin utiligante muron de najbara fortikaĵturo por sonorilejo.

La kapelo de *Corro* estas de la XV<sup>a</sup> jarcento kun arta maŭzoleo de inkviziciestro kaj aliaj tomboj kun

kuŝantaj statuoj de liaj gepatroj, sed ne tiel merit-plenaj kiel tiu de la filo.

En la enirejo de la urbeto estas rimarkindaj kaj pitoreskaj ruinoj de monaĥejo: la pordo, la absido kaj interne de ĉi tiu la alta altaro, simila je tiu de




Enirejo de Cártes.

*Santo Tomás de Avila.* Ankaŭ ekzistas aliaj rimarkindaj arkitekturaj restaĵoj.

La preĝejo de *Santa María de Bareyo* estas unu el plej belaj romanstilaj monumentoj de la regiono, kun unu sola navo kaj iniciatitaj transepto kaj kupolo atestantaj transiran periodon. La absido estas el tri entablementoj bele ornamitaj.

La portiko, kvazaŭ klaŭstro, al la Sudo, havas



Vilaĝo en la montaro.



simplan arkadon. La internaĵo estas tre rimarkinda : arkaĵoj, kapitejoj, el kiuj unu estas granda taŭro kun kapo alten kun longaj kornoj ; alta galerio de la dua



Kruco de Rubalcaba. Liérganes.

entablemento de la absido, belega, kiun kaŝas la malbela grandaltaro ; en la baptejo estas vera juvelo tre antikva, el la tempo de la gotoj : ĝi estas akvujo emajlita, el sola ŝtono, por la bapta ceremonio. Oni opinias ke la preĝejo estas de la XIII<sup>a</sup> jarcento, sed ke antaŭe estis en la sama loko alia preĝejo.

De la ogiva stilo estas rimarkinda la preĝejo de *Udalla* el du navoj egalaj ; tiu de *Santa Maria de Castro* en *Castro-Urdiales*, vera juvelo rimarkinda, el tri navoj, tre eleganta kaj gracia la centra, kun belega galerio el arkaĵoj sur tre graciaj kolonoj. En ĉi tiu preĝejo oni konservas ankoraŭ iujn el multenombraj juveloj, kaj artaĵoj. Ankaŭ estas du interesaj tomboj.

Je la fino de la XIII<sup>a</sup> jarcento oni starigis la ogivan preĝejon de *Laredo*, kiu estas interesa, kaj kies du mesaj librotleniloj estis donacataj de Karolo I<sup>a</sup>.

Malnovaj fortikaĵoj, turoj, estas tiuj de *Mogrovejo* en *Liébana*, de *Venero* en *Castillo*, *Trasmiera* ; de *Treto*, apud la fervoja stacio al *Bilbao* ; alia en *Puente Agüero* ; tiu de la *Orejones de la Lama*, en *Potes* ; kastelo de *Argüeso*, k. c.


Ankaŭ estas abundaj palacoj kaj nobeldomoj ĝenerale de la XVII<sup>a</sup> kaj XVIII<sup>a</sup> jarcentoj, kaj tiujn ĉi lastajn karakterizas familiaj blazonoj kaj grandaj elstarantaj balkonoj. Rimarkindaj, variaj kaj interesaj, estas ĉi tiuj konstruaĵoj.

## BANLOKOJ

Riĉa je famaj banlokoj mineralaj estas la teritorio : *Fuentes del Francés*, en *Hoznayo* ; *Solares*, *Liérganes*, *Puente Viesgo*, *Ontaneda*, *Alceda*, *Caldas de Besaya*, *La Hermida*, *Fontibre* en *Campó*, *Corconte* en *Campó de Yuso*.

GELI-COR

con goshua (La rable) — 128 —



Palacio de Elvado. Páramos.

gada Rosenörn, ilustrita eĉ kun multenombraj muzikaĵoj, 19×14 cm., 51 paĝa, luksa papero. PREZO : 0'75 sv. fr.

VIII.—EL MODERNA HISPANA PARNASO, enhavanta poemojn tradukitajn de Julio Mangada Rosenörn, kun belegaj ilustritaĵoj (20 bildoj), 19×14 cm., 32 paĝa, luksa papero. PREZO : 0'75 sv. fr.

IX.—DU JUNAJ FRAŬLINOJ kaj KORNELIINO, du noveloj el la bonekzemplaj noveloj de Cervantes, tradukitaj de Julio Mangada Rosenörn, 19×14 cm., 70 paĝa, luksa papero. PREZO : 0'75 sv. fr.

X.—¿QUE ES EL ESPERANTO?, verkita kaj aranĝita de Julio Mangada Rosenörn, entenanta hispanlingve opiniaron pri esperanto de tutmondfamaj eminentuloj, koncizan gramatikon, nur esperantan ekzercaron el tiu de la Majstro kaj sufiĉe kompletan esperant-hispanan vortaron ; tial la kajero 14×10 cm. kaj 32 paĝa estas vere kompleta lernolibro por hispanlingvanoj. PREZO : 0'15 sv. fr.

La PREZOJ notitaj enkalkulas la nerekomenditan poŝtelspezon, kaj por esti responda pri la alsendo, la mendinto devos aldoni 0'15 sv. fr. po mendo al la ĉiraj prezoj.

La mendon kaj ĉian korespondadon adresu al HISPANA ESPERANTO-ASOCIO. APARTADO 1.089. MADRID (HISPANIO). La MONON sendu al la Trezoristo : S-ro. Julián Sosa, strato Gonzalo de Córdoba, 22, Madrid (Hispanio).

ĈIAM NEPRE ANTAŬPAGU !  
NACIAJ ASOCIOJ KAJ TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZAJO HAVIGOS AL SI TRIONON DA RABATO KIAM LA MENDITAJ VERKOJ ESTU MINIMUME PO DEKO DE ĈIU VERKO.